n-ro 2 Decembro 1986

Eldonkvanto: 5.500 ekzempleroj

Ankoraŭ sen nomo, malgraŭ alveno de dekoj da sugestoj. Ni lasos la decidon por 1 9 8 7 ! ! !

# Nelson Pereira de Souza

Jam 11-jara li interesiĝis pri Esperanto pere de lia gimnazia instruisto. De tiam, Esperanto rolis kiel lia precipa vivointereso kaj volontula laboro, lige kun Spiritismo.

Li naskiĝis la 30-an de decembro 1925, en Rio de Janeiro, la sama urbo kiu akceptis la unuan esperantiston en nia lando, Francisco Valdomiro Lorenz, ĉeĥo forlasinta sian landon pro politikaj kaj religiaj persekutoj.

Nelson estis ĵurnalisto, poeto, tre klera persono, kaj profesie laboris en Banko de Brazilo.

Li fondis kaj kontribuis por la evoluo de pluraj esperantaj organizaĵoj, kiel Esperantista Asocio de Rio de Janeiro, Kultura Kooperativo de Esperantistoj, Esperanto-Asocio de Brasília, Brazila Konsilantaro de Esperanto, Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz, Laborgrupo Antaŭen.

Li estis escepta preleganto pri Esperanto, Zamenhof kaj Esperantismo. Krome, longjare li instruis Esperanton, movadumis, kompilis kaj tradukis multajn librojn en Esperanton, kaj, lastnovaĵe, lia edzino kaj firma apogantino, Fiorina de Souza (karese konata kiel NINA), informis nin, ke li postlasis originalajn verkojn.

Estante prezidanto de Brazila Konsilantaro de Esperanto, samtempe li estis elektita prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo, la 7-an de decembro 1985, pro la sola motivo, ke tiu duprezidanteco konsiderinde faciligus la kunfandiĝon de la du naciaj Esperanto-organizaĵoj. Efektive, dum 7 monatoj Nelson superhome laboradis por ke ĉiuj administraj kaj juraj taskoj estus plenumitaj. Kompreneble, ne mankis al li lojalaj kaj kompetentaj kunlaborantoj, ĉefe el Rio de Janeiro, kie tiam situis la sidejo de BEL.

Finfine, la revo, kaj lastatempe vera postulo, de la plimulto el la brazila esperantistaro - havi unu solan nacian Esperanto-organizaĵon - konkretiĝis, la 31-an de januaro 1986, kiam leĝe kunfandiĝis BEL kaj BKE. Nekontesteble, lia laboro, kuraĝo kaj firmeco estis esencaj por la ebligo de tiu fakto.

Nelson, kiu estis grave malsana dum siaj du lastaj vivjaroj, kaj neniam diris eĉ unu vorton pri tio, forpasis, en la urbo Rio de Janeiro, la 12-an de novembro 1986.

La brazila esperantistaro ŝuldas al li kaj dankon kaj respekton, kaj ĉi tie, ni prezentas ankaŭ nian saŭdadon...

# CENTJARO

Spite iniciatojn de diversaj instancoj, de unupersonaj esperantistoj, kaj spite aŭdiencon de la estraro de BEL kun la prezidanto de Brazila Poŝta Entrepreno (ECT), peton de deputito kaj ministro al la koncerna Filatela Komisiono, ĝi neis eldonon de speciala poŝtmarko pri la Centjaro de Esperanto en Brazilo. Motivo: ĝi multfoje omaĝis tiamaniere nian lingvon, kaj nuntempe ĝi decidis por aliaj temoj kiuj ne estis tiom malavare premiitaj, kaj cetere, la eldonado de poŝtmarkoj speciala estis trionigita en nia lando. Tamen, ni almenaŭ sukcesis gravurigon de speciala stampilo.

La monsumo de Nacia Esperanto Komisiono, destinita por la Centjaro, estos aplikita en laboro kiu plibonigos la informadon pri Esperanto en nia lando. Tiu investo celos rezultigi pozitivajn atingojn por nia afero.

Por organizi grandiozajn eventojn - kiel dezirate - ni bezonus trovi nian movadon en bonaj organiza kaj administra kondiĉoj, por doni al ni la necesan laborbazon. Kaj tiu kompleksa organizado ekpaŝas. Tial, 1987 estos peza semojaro, kaj espereble la venontaj estos bonaj rikoltjaroj.

## VOJAĜO AL VARSOVIO - 72-a Universala Kongreso de Esperanto

Ni kontaktis vojaĝagentejon kiu preparas prospekton kun ĉiuj informoj pri flugo, pago, hotelo, alloga traeŭropa ekskurso, k.s.

Jen eksterordinara okazo - malgraŭ la nunaj 'kruzadaj'cirkonstancoj - por ke ni brazilanoj karavane partoprenu en la plej atendinda universala kongreso de Esperanto.

BEL-ano ricevas kune kun ĉi tiu bulteno, aliĝilon de la 72-a UK. Aliaj interesatoj bonvolu peti de BEL la aliĝilon.

**FARU VIAN ALIĜON PERE DE BEL**

## 23-a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO - julion 1987

Informojn pri kongresurbo, dato, kotizoj, temo, vi ricevos en januaro. Bonvolu atendi !

# Merito

La Estro de la Federacia Distrikto, Deputito José Aparecido, decidis, pere de leĝa dekreto, premii 70 personojn kiuj kontribuis por la progreso de la brazila ĉefurbo en diversaj agadkampoj. Esperanto estis inter ili, kaj la prezidantinoj de Brazila Esperanto-Ligo (Néia Lúcia Souza) kaj de Esperanto-Asocio de Brasília (Neima Adorno) ricevis sian medalon, la 6-an de novembro 1986, en la Palaco Buriti.
Unu el la plej famaj brazilaj kantistinoj, GAL COSTA, estis same premiita, kaj tiam, la esperantistoj tie ĉeestantaj, aldemandis ŝin pri Esperanto kaj pri la ebleco, ke iam ŝi kantu en Esperanto !

S U P E R A   K O N S I L A N T A R O

Ok organizaĵoj aliĝis al BEL, kaj indikis siajn konsilantojn:
- Brazila Esperantista Junulara Organizo;
- Esperantista Asocio de Santa Catarina;
- Esperanto-Asocio de Brasília;
- Esperanto-Asocio de San-Paŭlo;
- Klubo Esperantista Zamenhof (Pará);
- Paraná Esperanto-Asocio;
- Pernambuco Esperanto-Asocio;
- Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz (Rio de Janeiro).

La Supera Konsilantaro jam ekfunkcias kaj influas la movadajn decidojn, kiel ekzemple pri fikso de BEL-aliĝkotizo por 1987.

Kaj la aliaj indikotaj konsilantoj... kiam ili survestos sian labortalaron ?

BRAZILA ESPERANTISTO - Itacir Luchtemberg, BEL-estrarano el Paraná, prilaboras proponon pri reformo de nia revuo, kiu estos oportune analizita.

Faru viajn pagojn al BEL prefere per ĉeko je la nomo de "LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO".

LIBROSERVO

1) Organizaĵoj ricevos rabaton de 20% kontraŭ aĉeto de minimume dek libroj samtitolaj, kaj ne de 5% kiel aperis en nia flava librolisto 01/86.

2) Novaĵo

ESPERANTO
LINGUA INTERNACIONAL
PELA PAZ ENTRE OS POVOS

Bela plastumita menglua etikedo, 5 x 15 cm blanka fono kun verdaj kaj orkoloraj literoj

unu = Cz$ 10,00
dek = Cz$ 80,00

ABONO DE REVUOJ - ni kontaktis 25 eksterlandajn eldonantojn por peri iliajn revuojn, cele disponigi al vi vastan elektoeblecon pri interesaj publikigaĵoj.

Intertempe, vi povas aboni ĉe BEL la jenajn revuojn por la jaro 1987:

- EL POPOLA ĈINIO
  Se temas pri NOVA ABONO (ne re-abono), nepre informu nin !
  unujara abono .................................... Cz$ 92,00
  dujara abono .................................... Cz$ 155,00
  trijara abono .................................... Cz$ 226,00

- HEROLDO DE ESPERANTO
  unujara abono .................................... Cz$ 113,00
  NOVAJ abonantoj (prezo de 1986) .................. Cz$ 71,00
  Se vi volas ricevi Heroldo-n AERPOŜTE, vi devas aldoni al la prezoj Cz$ 57,00 !

- Revuo ESPERANTO (ne inkluzivas aliĝon al UEA)
  unujara abono .................................... Cz$ 168,00

- Revuo KONTAKTO (ne inkluzivas aliĝon al TEJO)
  unujara abono .................................... Cz$ 84,00

- SCIENCA REVUO (inkluzivas membrecon al Internacia Scienca Asocio Esperantista - se dezirate)
  unujara abono .................................... Cz$ 60,00

- FONTO (literatura revuo)
  unujara abono .................................... Cz$ 140,00

- SIMPOZIO (filozofia revuo)
  unujara abono .................................... Cz$ 35,00

## PERKOMPUTILA LABORO

La mikrokomputilo disponita al BEL (CP-500) jam solvas parton el la malfacilaĵoj nature enestantaj en oficeja taskaro.

Ĉiuj membro-adresoj estis listigitaj kaj ankaŭ adresoj de aliaj esperantistoj, simpatiantoj, k.s.

Tiu ampleksa perkomputila ordigado rezultigas tempoŝparon por la estraranoj kaj kunlaborantoj, ĉar anstataŭ tondi milojn da adresoj, glui ilin sur kovertojn, ni nur fiksas memgluajn etikedojn.

Unu el la atingoj de tiu laboro estas la pretigado de Katalogo de Brazilaj Esperantistoj, sed por ĝisdatigi tiun taskon nepras la partopreno de ĉiuj, pere de la jenaj agoj:

- asocioj, lokaj grupoj, k.s., sendu al BEL adresliston de siaj membroj, eksmembroj, lernantoj kaj interesatoj pri Eo;
- instruistoj de Esperanto sendu al BEL adresliston de siaj lernantoj;
- ricevinte korespondaĵon de BEL, bonvolu informi nin pri eventualaj eraroj;
- NENIAM FORGESI INFORMI NIN PRI ADRESŜANĜOJ.

La kas-, libro-, biblioteko- kaj sekretario- servoj estos ankaŭ aŭtomatigitaj.

Post 4-monata laborado tiukampe, ni konstatis, ke tiu mikrokomputilo ne plenumos ĉiujn niajn bezonojn.

Sekve, baldaŭ BEL necesos havi plipotencan komputilon, kaj... des pli bone se PROPRAN !

## BIBLIOTEKO


Ĝi estas konvene aranĝita en metalaj bretoj, kaj la sekvaj paŝoj estos aŭtomatigo de ĝiaj servoj, kaj disponigo de la libro provizo al la membroj de BEL, prunte, sendepende de kie li/ŝi loĝas.

DONACO - la estraro de la Laborgrupo Antaŭen donacis al BEL duonon de ĝia librohavaĵo, kiu riĉigis nian librservon. DANKON al la donacintoj.

**Ni ankoraŭ bonvenigas sugestojn por nia ĵurnaleto !**

FELIĈAN KRISTNASKON

kaj ke 1987 alportu al vi
AMON (donu parteton al Esperanto)
SANON (tiel vi povos ankaŭ labori por Esperanto)
PACON (pluestu batalanto, sed paca !)



PARTOPRENINDAJ ESPERANTO-EVENTOJ EN 1987

Februaro: 2-9 (9-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso, en Fortaleza, CE. Temo: Esperanto 100 jaroj - BEJO 20 jaroj)

Julio : 25/1 aŭg (72-a Universala Kongreso, Varsovio)
(23-a Brazila Esperanto-Kongreso)

Oktobro : 9-12 (47-a Angentina Kongreso de Esperanto, Rosario, Temo: Esperanto en Latinameriko)
11-19 (Internacia Festivalo pri Turismo, Komunikado kaj Kulturo, Caracas, Venezuelo)

AVERTO: por transdoni resenditajn Eo-atestojn pri korespond-kursoj, ni bezonas la aktualan adreson de la listigitaj personoj: Alessandro Bifarelli, Arnaldo Fulgoni dos Santos Lara, Elizabeth de Almeida Fonseca, Esio Sardinha de Souza, Flávio Martins Carneiro, Gilvandro Pereira da Silva, Helena Vicente Leitão, Jorge Luiz Alves Martins, Júlio Cesar Souza Mota, Lourival Etevaldo de Lima, Lucy Prudente dos Santos Beleza, Marcelo Biangolino Xavier, Maurício Biangolino Xavier kaj Paulo Jorge de Almeida. BONVOLU INFORMI NIN. DANKON !

BRAZILA ESPERANTO-LIGO - BEL
SCS Ed. Jockey Club, sala 103 (70300 Brasília-DF)
Caixa Postal 11-1105 (70084 Brasília-DF)
Telefon-nro: (061) 226-1298